Joseph Freiherr von Eichendorff,

Freŝa veturo

tradukita de Manfredo Ratislavo

Milde la aero fluas,
Ja printemp´ fariĝu nun!
Enarbare kornoj bruas.
Blua helo, brila sun´!

Kaj la vivo plibuntiĝas,
Iĝas ĝi sovaĝa flu´,
La rivero plilarĝiĝas,
Kaj min logas plu kaj plu.

Kaj mi volas min ne teni,
For de vi min pelas vent´,
Kaj mi lasas min fortreni,
Blinda pro beata sent´.

Voĉoplenas la aero,
Flame ruĝas la ĉiel´,
Kaj min portas la rivero
For al nekonata cel´!

Traduko de la Germana poemo "Frische Fahrt" de JOSEPH FREIHERR VON EICHENDORFF *(∗1788-03-10 – †1857-11-26) en Esperanton de* MANFREDO RATISLAVO *(Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, ∗1938-11-04) en 1993-05-08.*

MR-257-1d / Arg-60-117 (2003-10-26 00:28:57)